

TEA-BULTENO

18^A JARO - N^o 126

JULIO - AŬGUSTO

N. 7-8/2015

Karaj Gelegantoj!

Finfine alvenis somero kaj ni povos ĝui belan sunan veteron vizitante kongresojn, kunvenojn ktp ĉie tra la mondo. En ĉi Bulteno eblas trovi kelkajn sugestojn por viaj celoj. Antaŭ ol bondeziri al vi bonan someron, mi havas tre gravan anoncon, kiu certe vin bele surprizos.

Tre baldaŭ estos aĉetebla monumenta verko: "HISTORIO DE LA ESPERANTA LITERATURO".

Carlo Minnaja kaj Giorgio Silber, ĝiaj aŭtoroj, jam liveris al la presisto la enhavon de

la verko, el kio fontos post kelkaj semajnoj preskaŭ 800-paĝa libro. La preso okazos per usona teknologio, la bildo laŭ itala tradicio, apud Milano. Laŭ takso unu ekzemplero, en B5-formato, pezos 1.400 gramojn.

La libro aperas sub la aŭspicio de PEN International (Esperanto-Centro) kaj de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino. La estraro de la Akademio de Esperanto jam esprimis oficialan gratulon, per mesaĝo de

prof. Christer Kiselman, ankaŭ nome de siaj kolegoj Probal Dasgupta, Brian Mon, Renato Corsetti.

Eblas mendi ĉe la eldonejo (lf-koop esperantio.net / LF-koop, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds).

Bedaŭrinde la rabatperiodo jam finiĝis, sed sur via breto ne povas manki tiu ĉi vere impona verko, per kiu vi kontaktiĝos kun la multaj valoraj aŭtoroj de nia Esperantujo.

Via redaktanto

El Gazetaraj Komunikoj de UEA

N-ro 579

NOVA ĜENERALA DIREKTORO: TRI KANDIDATOJ INTERVJUATAJ

En februaro 2015, la Estraro de UEA anoncis konkurson por la posteno de Ĝenerala Direktoro, celante trovi posteulon por Osmo Buller post lia emeritiĝo en la unuaj monatoj de 2016. La limdato por kandidatiĝoj estis la 31^a de majo.

Ĝis la limdato venis ses kandidatiĝoj. Post plureta diskutado, la Estraro decidis inviti tri el la kandidatoj al persona intervjuo en Lillo, la 24^{an} de julio, unu tagon antaŭ la komenco de la 100^a Universala Kongreso.

La tri kandidatoj invititaj al intervjuo estas Konrad Andrzejuk el Pollando, Veronika Poór el Hungario kaj Nikola Rašić el Nederlando.

Ni estas kontentaj fronti elekton inter pluraj interesaj kaj kapablaj kandidatoj, komentis d-ro Mark Fettes, Prezidanto de UEA. La intervjuoj donos okazon por pli fundaj diskutoj pri la direktoj, prioritatoj kaj kondiĉoj de la laboro. Ni serĉas homon, kiu povas gardi la plej gravajn tradiciojn kaj trajtojn de UEA, sed ankaŭ kungvidi procezon de renovigo kaj modernigo.

BIBLIOTEKA APOGO BACHRICH atendas viajn subvencipetojn

UEA disdonos por la dua fojo subvenciojn el la Biblioteka Apogo Maria kaj Johano Bachrich por helpi pliriĉigi kolektojn de Esperantobibliotekoj. La komenca kapitalo (USD20.000) de tiu speciala fondaĵo estis donacita de la gefiloj de ges-roj Bachrich pasintjare. La eminenta venezuela esperantisto Johano Bachrich (1921-2005) estis Honora Membro de UEA kaj longtempa motoro de Venezuela Esperanto-Asocio. Ankaŭ lia edzino Maria (1936-2011) estis esperantisto.

Biblioteka Apogo Bachrich povas subteni E-bibliotekojn, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia nemovada instanco. La subvencioj estas uzablaj por akiri librojn aŭ aliajn varojn, kiuj estas aĉeteblaj ĉe la Libroservo de UEA.

Por peti subvencion, oni sendu priskribon pri la biblioteko kaj liston de dezirataj libroj aŭ aliaj varoj, ordigitaj laŭ prefero. La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 30^a de aŭgusto 2015 papere (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ retpoŝte (direktoro@co.uea.org).

(El N. 578—Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Kiu neniam havis hundon, ne povas scii kion signifas ami kaj esti amata.

Arthur Schopenhauer, germana filozofo (1788-1860)

Arkeologiaj elfosaĵoj

En Egiptio estis antaŭ iom da tempo trovita ege granda, komuna fosaĵo, en kiu kuŝis ok milionoj da mumiigitaj hundoj. La loko estis malkovrita de Arkeologoj el Saqqara, 30 km-ojn sude de Kairo. Laŭ la klarigoj troveblaj en la ttt-ejo 'Discovery News', la hundoj-mumioj kuŝis en iaspeca katakombo, ene de tre vasta rektangula areo el 173x140 metroj. Ĝi apudis la templon dediĉitan al Anubo, la dio kun ŝakala kapo, protektanta la nekropolon kaj la mondon de l' mortintoj.

Laŭ la esploristoj, tre probable la bestoj estis oferdonacitaj al tiu dio, kiel signo de fideleco aŭ dankemo. Sed povus eĉ esti, ke tiuj hundoj mem estis la objektoj de kultado.

Tiu speciala nekropolo de Saqqara, ne tiom malproksima de la piramidoj de Giza, estis jam esplorita en la 19^a jc, sed nur antaŭ malmulta tempo oni sukcesis finfari la elfosadon, kiu finfine vidigis ĉiujn mumiigitajn hundojn, grandparte konservitajn en ujoj el terakoto. La arkeologia profesoro Paul Nicholson, (Universitato de Cardiff), responsa pri la elfosadaj laboroj, klarigis, ke probable tiu teritorio estis dense loĝata kaj ke la homa komunumo tie vivanta okupiĝadis pri la kultado de bestoj.

Alia eksterordinara malkovro surprizis ĉiujn: sur la roka plafono, superstaranta la katakombon, estis trovita fosilio de grandioza mara 'monstro', vertebrulo el antaŭ ĉ. kvardek ok milionoj da jaroj. «La antikvaj elfosantoj eble ne konsciiĝis pri ĝi aŭ tute ĝin malatentis» tiel eksplikis Paul Nicholson.

Estis esplorita la tuta katakombo, en kiu troviĝis mumioj ankaŭ de aliaj bestoj, kiaj ŝakaloj, vulpoj, falkoj, katoj kaj mungotoj. Multaj el la hundoj estis eĉ kelktagajn aĝaj. La plej maljunaj ricevis pli ellaboritan sepultadon, kio sugestas, ke eble tiuj vivis en la templo mem, dum la idoj supozeble estis speciale breditaj por la kultado. Nenian perfortan agon tamen oni trovis sur la korpoj.

Alia interesa ĉapitro pri vivo kaj historio de la antikvaj egiptoj nun malfermiĝas antaŭ la okuloj de arkeologoj, fakuloj, sciencistoj kaj eĉ de normala publiko.

82^a Itala Kongreso de Esperanto - San Benedetto del Tronto 22-29 aŭgusto 2015

Kongresa temo - Kultura tutmondiĝo: limoj kaj perspektivoj
kaj samtempe

81^a Internacia Kongreso de blindaj Esperantistoj

Tre riĉa programo atendas multenombrian partoprenantaron: ĉiu havos la eblon gustumi sukajn frandaĵojn. Sufiĉas navigi en la ttt-ejo prikongresa <http://kongreso.esperanto.it/82/?lang=eo> por konsciiĝi ke vere indas ĉeesto.

Ĉu allogas vin prelegoj de Davide Astori, pri "Ĉu la esperantista utopio ankoraŭ havas signifon hodiaŭ?" Aŭ pri "La 'Jarmilaj evolu-celoj' de UNO: kial ili malsukcesis?" Ankaŭ pri gramatikaĵoj oni parolos: "La difina artikolo: ekesto kaj prospero" estos pritraktita de Fabrizio Pennacchietti. Eĉ du seminarioj okazos: unu pri "Kultura tutmondiĝo: limoj kaj perspektivoj" gvide de Mark Fettes kaj la alia pri "La originala literaturo en Esperanto" fare de Nicola Ruggiero, kaj de Carlo Minnaja estos prezentita la libro: "Historio de la esperanta literaturo", verkita de li mem kaj Giorgio Silfer.

Sed estas ankoraŭ pliaj allogaĵoj, sen paroli pri kursoj diversnivelaj, pri ekskursoj en la regiono, pri koncertoj kaj teatraĵo... Do, ne hezitu kaj tuj aliĝu, por ne perdi ĉi unikaĵon!



Kvizo de Viglo

Ŝtrioj de Salomono

Ĉu vi sukcesis solvi la facilan kvizon proponitan de Viglo? Ŝajnas al mi, ke neniu havis la tempon por eltrovi la proverbon de Zamenhof. Bedaŭrindas, ĉar la premio estis vere interesa. Do, tiun mi flankemetos por alia fojo. Jen en la centra linio, brunkolore, la solvo!

1	L	A	N	O	2	E	R	O	D	I	3	D	R	U	M	A	S
	L	A	A	F	E	R	O	N	E	B	R	U	L	A	S		
4	D	I	A	F	A	N	A	5	N	E	B	U	L'	6	L	A	Ŭ

Lanital: kio estas tio?

Kiu ankoraŭ rememoras, kio estas/is Lanital? Laŭ la nomo, oni eĉ povus diveni: lano+itala. Jes, ĝuste pri tio temas, sed ... ja estas unu sed! Normale lano estas natura teksfibro eltirita el la mola hararo de ŝafoj kaj kaproj, kuniĵoj, kameloj aŭ lamoj. Ĝi akiriĝas el tondado de ilia hararo. Kaj do, ĉu *Lanital* estis simple itala lano? Ne, tute ne.

Lanital estis artefarita lano devenanta el la kazeino, proteina produktaĵo el la lakto. Ĝi estis eltrovita de la kemiisto kaj entreprenisto Antonio Ferretti, loĝinta en la urbeto Gavardo, apud Breŝo (it: Brescia).

Li ĝin malkovris en 1935, post trijara nokta studado pasigita en la kelo de sia loĝejo.

La kazeino, eltirita el la negrasi bovina lakto, estis elpurigata, sekigata kaj traktata per alkala aganto kiu ĝin transformis en viskecan mason: la tekso-kazeinon. La solvaĵon oni traigis tra dratretoj je ege etaj truoj. La maldikaj bavuroj estis metitaj en koaguligan banon, kiun sekvis procedoj de nesolvebleco, lavado kaj sekigado. Je tiu punkto, la rezultintaj flokoj pretis por la ŝpinado kaj teksado.

Tiam *Lanital* ricevis grandiozan sukceson. SNIA VISCOSA (elp: Snia Viskoza), iama grava kemia firma, fondita en 1917 en Torino, fakiĝinta en la sektoro de artefaritaj tekso-fibroj, aĉetis la patenton de A. Ferretti kaj donis al li altnivelan direktoran postenon. Tiun ĉi teksaĵon oni ekproduktis en 1937.



Estis tiam la periodo de aŭtarkio, kiun Italio estis travivanta, kaj tiu fibro estis elektita kiel ideala anstataŭanto de la natura lano. Pro la sankcioj kaŭzitaj de la milito en Etiopio, la faŝisma reĝimo sponsoris ĉi produkton kiel unu el la simboloj de la landa aŭtonomeco kaj memsufiĉo. La produktado kreskis grandioze, ĝis atingi, en 1947, la kvanton de 14.000 tunoj. Rapide *Lanital* disvastiĝis ankaŭ al aliaj landoj: en Eŭropo - Francio, Germanio, An-

glio, en Ameriko - Kanado, Usono kaj eĉ en Azio - Japanio.

Sed, post la 2^a mondmilito, tiu ĉi teksofibro estis lasita flanke, ĉar ĝi havis malsuperajn kvalitojn kompare al la lano, kaj ankaŭ pro la apero de novaj artefaritaj fibroj. Tamen ĝi, sub la nomo *Merinova*, estis produktata, kun kelkaj plibonigaj ŝanĝoj, ĝis 1968.

Ĉu la historio finiĝas tiel ĉi? Ne, tute ne, nun mi reprenas la fadenon (de *Lanital!*) tranĉitan en tiu jaro, por ĝin alligi al alia historio, tute pli moderntempa.

Antaŭ pli-malpli 3-4 jaroj Anke Domaske, germana stilistino kaj mikrobiologo, reprenis tiun ideon, kun la precipa celo krei fibron el materialo reciklebla pere de eltenebla procedo, konsidere de la fakto ke por realigi *Lanital*-on oni uzadis toksajn substancojn, malutilajn por la medio. Post du jaroj da esplorado kaj pliperfektigado de la projekto, danke ankaŭ al modernaj teknologioj, ŝi registris sian patenton. La nova fibro, baptita *Qmilk* (Qualite + Milch =

kvalito + lakto), estis produktita el industriaj rubaĵoj. En la nura Germanio, ĉiujare, estas forĵetitaj ĉ. du milionoj tunoj da lakto, el acidiginta lakto, nome tiu ne plu taŭga por la homa konsumo: de tie startas la prilaborado de teksaĵo! Dum la produktada ciklo tre malalta estas la uzo de malutilaj nocaj kemiaĵoj kaj plie - kio ege gravas precipe en la nuntempo - la prilaborado postulas utiligon de malmultkvanta akvo: por realigado de unu kilogramo da *Qmilk* bezonatas malpli ol du litroj da akvo. Por ekhavi la saman kvanton da kotonono oni malŝparas pli ol dek mil litrojn!

La organika polimero, tiel eltirita, povas esti aplikata en plej diversaj sektoroj. Kontraŭbakteria kaj varmoreguliga, dermatologie testita kaj sana je kemiaj aldonaĵoj, krom por la produktado de vestoj, ĝi povas esti uzata ankaŭ por elfari bandaĵojn kaj gazojn, en la aŭtomobila fabrikado por la interna tapetado kaj, fine, por realigado de kosmetikaĵoj.

Anke Domaske el Hannover deklaris: "La teksofibro estas glata, delikata, freŝa, ekologia kaj sana por la haŭto ĉar ĝi ne kaŭzas alergiajn. Ĉi tiu teksaĵo povas ankaŭ helpi reguligi la korpan temperaturon kaj la sangon cirkuladon. Por havi ŝtofon necesan por tajlori virinan robon sufiĉas nur 6 litroj da akvo!"

En ĉi lastaj jaroj, laŭŝajne, kreskis ankaŭ en Italio la demando pri "ekologiaj" kazeinaj fibroj, devenantaj el naturaj substancoj, treege bezonataj por malpliigi la sisteman poluadon de nia kompatinda planedo.

Por scii iom pli, legu en la ttt-ejo

de.qmilch.eu



La esperantistoj de Posavje kune kun la Slovenia Esperanto-Ligo (SEL) invitas vin al la Internacia Amika Esperantista Renkontiĝo (AER) en Brežice. La renkontiĝo okazos

sabaton, la 25^{an} de julio 2015.

Eblos tranokti ĉe la Hostelo de Junulara Centro Brežice kaj la sekvan tagon, la 26^{an} de julio, viziti iujn turismajn lokojn, proksimajn al Brežice. Tranoktejo kaj vizitoj estos pagendaj surloke. Kiel eble plej frue oni aliĝu!

Bv. plenigu la suban aliĝilon kaj resendu ĝin al la suba retadreso: antonmhl@gmail.com
Rekomendite estas legi la pliajn detalojn trov-eblajn en la ttt-ejo: www.antonmihelic.com

ALIĜILO

Persona k familia nomoj: _____
de la Esperanto-Societo: _____

Mi aliĝas al la IAER, la 25^{an} de julio 2015.

Mi deziras - mi ne deziras (substreku!) tranokti de la 25^a ĝis la 26^a julio 2015 kaj viziti (substreku la deziratajn turistajn direktojn!):

A) Brežice-Rapejo Najger, Brezovica, Bizelj-sko-Brežice "Kelo de ĉampanoj Istenič", Stara vas, Bizeljsko-Brežice (aŭte) ĉirkaŭ 15 km;

B) Brežice-Terne "Paradiso" Dobova (3-hora naĝado)-Brežice (aŭte)- ĉirkaŭ 7 km;

C) Brežice-Čatež ob Savi-Šentvid super la vilaĝo Čatež ob Savi: 388 m super la maro

Kio en Gresillon, julie kaj aŭguste?




- 2015-julio-06/13: Ferioj - Familioj - Interŝanĝoj reciprokaj de scioj, por familioj kun infanoj, variaj aktivaĵoj kaj Esperanto-kurso;
- 2015-julio-20/25: Kasteloj de la Luaro - Turisma semajno - oficiala antaŭkongreso de la 100^a UK en Lilo;
- 2015-aŭgusto-01/08: Lingvoj kaj kulturoj de l' mondo - postkongreso de la 100^a UK
- 2015-aŭgusto-08/16: Festa Semajno por infanoj kaj familioj - postkongreso de la 44^a IIK.

Dimanĉon la 13^{an} de septembro 2015 Festo de Amikeco sur Monto Forno

Sur la Trilanda Pinto - Dreiländer-eck, renkontiĝos laŭtradicie la esperantistaj grupoj de Aŭstrio, Slovenio kaj Italio.

Triestanoj kaj italoj, ne maltrafu ĉi okazon pasigi gajan dimanĉon en esperantista kaj internacia etoso. Rendezuo ĉe la simbolo ekde la 12^a horo. Tie Martin Stuppig bonvenigos nin ĉiujn!



(piede ĉirkaŭ 45 minutoj)-Čatež ob Savi-Brežice (per aŭto + piede) ĉirkaŭ 4 km.

Retpoŝt-adreso: _____

Sinceran Bonvenon al Ĉiuj!

4a IKTS post la UK 2015

1-8 aŭgusto 2015

Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo




Internacia Kultur-Turisma Semajno

Ĝoju pri tiu modelurbo por Esperanto meze en Eŭropo, en la alloga, pitoreska turisma regiono de la Harz-montaro.

Riĉa kaj alloga programo atendas vin!

- ★ Ĉiĉeronado tra la urbo, sekvante la multajn Esperanto-ŝildojn;
- ★ Ekskursoj al apudaj vilaĝoj kaj urbetoj;
- ★ Konatiĝo kun la reprezentantaro de la Esperanto-urbo;
- ★ Kulturaj vesperoj: muziko, prelegoj, lingvaj ludoj, filmoj, aŭkcio...
- ★ Naĝadoj, promenadoj en la freŝaj arbaroj;
- ★ Mirinda etoso en esperanta medio.

Ĉiu alia detalo (aliĝilo, kromaj informoj ks) troveblas ĉe: <http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=16370833>.



E-to ĉe Alirprogramoj de RadioUno je la h. 14.50

Ne forgesu aŭskulti la radian disendon en la sube indikitaj tagoj.

Merkrede la 13^{an} de julio: Projekto Grundtvig: Elloke tutmonden: la novaj defioj de volontulado.

Vendrede la 7^{an} de aŭgusto: Projekto Grundtvig. Bonan aŭskultadon!

Mallonge pri:

FESTO ĈE ANITA, sabaton la 18^{an} de julio, ekde la 18^a horo.

Priajn informojn petu de Edvige aŭ Elda.

Fermo de la asocia sidejo: julie kaj aŭguste!

Aktiveco en TEA-sidejo ree komenciĝos

vendredon la 4^{an} de septembro, je la 19^a h.

Bonan someran tempon kaj ĝis septembro!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste

Kunventagoj: marde 17-20; vendrede 19-21

Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936

Banka Konto: Unicredito—IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439

Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

Asociaj ttt-ejoj: www.tea1906.altervista.org;
www.karstajtagoj.altervista.org